



La bela petveturantino

SUS BILITIKAJ RAKONTUJ

Leopold Vermeiren

La bela petveturantino

La bela petveturantino

SES EROTIKAJ RAKONTOJ

Leopold Vermeiren

Tradukis Lode Van de Velde

La bela petveturantino

Eldono de Flandra Esperanto-Ligo

Tiu ĉi prov-libro estas libere kopiebla kaj transdonebla al ĉiu ajn.

La bazarbudulino kun la verdaj okuloj

„Saluton, Marko.”

Marko malfermis la okulojn. Li sidis en sia alta, komforta fotelo kun ambaŭ gamboj trans la brakapogilo.

„Vi endormiĝis, karulo. Kaj vi ankoraŭ ne rakontis vian rakonton eĉ.”

La poeto rigardis kun strangaj okuloj. Ŝajnis ke li ankoraŭ troviĝas en alia mondo. Li ne respondis.

„Nu, karulo?”

Nur tiam li rigardis Silvian.

„Mi havis strangan sonĝon, li diris.”

„Poste vi povas plusonĝi, Marko. Sed ĉi tie vi ne kuŝas komforte. Ni iru al la lito kaj tie rakontu al mi vian historion.”

„Ekpensu jam pri la tri vortoj.”

„Silvia rekten tiris Markon el la seĝo. Brakon en brako ili eniris la dormoĉambbron.”

„Nu, knabino, kio pri la vortoj, demandis li, dum li senvestiĝis.”

Silvia jam sidis nude sur la rando de la lito. En la somero ili ĉiam dormas nudaj, tio donas agrablan senton de libereco.

„Sonĝo,” diris ŝi.

„Vorto kiun mi atendis.”

„Propra sonĝo... lasta sonĝo.”

„Ruzulino! Vi volas eltrovi kion mi sonĝis.”

„Efektive, Marko. Cetere tio plifaciligas la taskon. Vi hodiaŭ eĉ ne devas uzi vian fantazion.”

„Prave, kvankam...”

„Kvankam?” ripetis Silvia demande. Sed Marko ne reagis al tio.

„Estis stranga, tre stranga kaj konfuza sonĝo, Silvia. En la komenco almenaŭ, sed kun bela fino. Ĉu mi nur rakontu la finon?”

„Komencu ĉe la komenco, karulo.”

Marko kuŝigis sin tutsterne sur la dorson. Silvia ŝovis sin proksimen kontraŭ lin kaj metis sian kapon en la neston de lia suprenfleksita dekstra brako. La malfrua suno ĵetis ankoraŭ faskon da rozkolora lumo sur la tapeton kun parto de verda ombro. La ombro-makulo pligrandiĝis.

„Mi vidis aron da infanoj, knabinoj en bluaj uniformoj, ĉiuj kun blua matrosa kolumeto. Ili adoleskiĝis, ĉar ie kaj tie jam estis pli plena bluzo. La knabinoj, almenaŭ la plimulto, surhavis mallongajn jupojn. Mi vidis dekojn da modeloj de gamboj. Estis festotago, tio videblis per la neĝblankeco de la kolumetoj kaj la gladita banto en ilia hararo. La sekvan momenton ili sidis en kapelo. Ili kantis. Delikataj, altaj voĉetoj. La suno eniris tra la kolorigita fenestrovitro. Tiuj, kiuj ricevis ruĝon, estis la plej belaj. En fenestroj, ruĝa estas konvena koloro.

En sonĝo, ĉio iras rapide. Ĉio ankaŭ ŝanĝiĝas rapide. Pluvis kiam ni iris eksteren. Mi diras „ni” ĉar mi iris kun ili. Sur la mallarĝa ŝtuparo, kiu kondukis al la ĝardeno, la knabinoj devis silenti sed ili gaje babiladis, spite la ordonojn de la instruistinoj.

„Silentu, knabinoj!” mi admonis. Kaj mi rigardis supren tiel ke mi sub la jupetoj vidis la lulantajn junajn femurojn kaj la kalsonetojn. Ili estis blankaj, rozkoloraj, bluaj, flavaj, la plej multaj borderitaj per frivola punto. Kial fakte tiuj pantalonetoj devas esti tiom belaj, neniuj rajtis ilin vidi. Ĉe mi okazis senintence.

Ĝuste antaŭ mi iris ok monaĥinetoj, kiuj ja faris la plej grandan bruon.

„Ŝŝ... fratinoj” mi admone siblis.

Unu turnis sin. Ŝi havis afablan, sed petolan vizaĝeton. Ŝi ĵetis al mi mankiseton, pro kio la aliaj ridis.

Jes, ekstere pluvis, pluvis gutege, diluvo estis nenio kompare al tio. Per niaj bele ciritaj ŝuoj ni plaŭdis tra densa kaĉo de akvo kaj ŝlimo. La vojo de la kapelo ĝis la festsalono estis subakviĝinta kaj ni devis promeni sur la flanko, la rando de betkampo.

Kaj subite mi estis tie tute sola. En la koto ĉirkaŭ mi estis bankbiletoj, kun unu angulo ankoraŭ super la koto. Kaj kiam mi eltiris ilin, ili montriĝis guldenoj.

Kaj tiam, sen transiro, ne plu estis pluvo. Mi staris en vilaĝo kie estis bazartago. Tute en la komenco staris budo kun ĉapeloj kaj kaskedoj. Mi elektis al mi bluan malaltan ĉapelon kun larĝa rando. Ankaŭ aliaj homoj elektis al si ĉapelon sed neniu petis monon kaj neniu pagis. Mi metis la ĉapelon sur la kapon kaj atendis iun, sed mi ne plu povas rememori kiun. Mi promenis plu. Ĝuste apud turo, preskaŭ je la angulo de iu strato, staris budo kun lud-pupoj. Belaj, grandaj pupoj. Antaŭ ĝi staris dika sinjorino, ŝi estis tre okulfrape vestita laŭ Felini kun granda rozkolora krinolino kaj blua bluzo. Ŝi estis forte dekoltita, la strato inter ŝiaj abundaj mamoj estis ĝis tre profunde videbla. Sed plej halucina estis ŝia kapo. La hararo estis alte fiksita, purpur- kaj oranĝkolora kun dekoj da bantoj kaj malgrandaj floroj. La palpebroj estis forte bluaj kolorigitaj, la suprenigitaj okulharoj nigre kaj sub ŝiaj brovoj troviĝis rozkolora strio.

Apud ŝi staris pli juna virino, ankaŭ tre ekstrapagante vestita sed ne demandu al mi kion ŝi portis, ĉar mi nur rigardis al ŝiaj okuloj. Neniam antaŭe en mia vivo mi vidis tiajn belajn, verdajn okulojn.

La dika sinjorino trudeme proponis al mi kelkajn lotetojn. Mi povis gajni per ili unu el tiuj pupoj. Sed mi preterkuris ŝin, fortunante mian kapon.

Je la angulo de la strato mi ankoraŭfoje rigardis malantaŭen. La virino kun la verdaj okuloj rigardis min, kaj mi eĉ havis la impreson ke ŝi kapsignis al mi. Mi reiris, rigardis ŝiajn okulojn kaj aĉetis loton de la dika sinjorino. Kiam mi poste malfermis la koverton kaj enmanigis rozkoloran karton kun numero al la matrono, ŝi diris kun itala akĉento: „Vi gajnas

pupon.”

Ŝi tute ne ŝajnis feliĉa. Ŝi turnis sin, prenis ludpupon kaj etendis ĝin al mi. La pupo havis tre belan vizaĝon sed ĝi estis ekscese envolvita en tulaj vestoj. Sub la robo ĝi portis rozkoloran, puntan kalsoneton kaj ĝi surhavis nigrajn ŝuojn.

La juna virino kun la verdaj okuloj rigardis min la tutan tempon. Ŝi ridetis. Sed malgranda viro en nigra kostumo, kiun mi antaŭe eĉ ne rimarkis, ekstaris inter ni du.

„Ankaŭ vi povas gajni milionon,” li diris nedemandite. „Se vi gajnus la milionon, kion vi farus per ĝi?”

„Mi havas mian propran domon,” mi diris, „mi havas mian profesion, mi havas sufiĉe da mono por manĝi kaj trinki kaj pluvivi. Mi do ne sopiras gajni monon, mi ne volas indignigi Dion pro riĉeco. Ne, lasu, mi ne volas gajni la milionon.”

„Sed se vi tamen gajnus ĝin,” insistis li.

„Ho, mi disdonus ĝin al la povruloj, al la veraj povruloj do, al la mizeruloj, restas ankoraŭ tiom da povruloj en nia mondo.”

Ĉu la respondo ne plaĉis al la nigra vireto? Ĉu estis la diablo persone? Li ĵetis sin sur min, tiris la pupon neatendite el mia mano kaj ĵetis ĝin en la koton. Estis denove koto, mi rimarkis.

Kaj subite ankaŭ troviĝis homamaso. Ili ĉiuj komencis krei kaj indigne insulti la vireton. Kaj al mi ili diris:

„Ĉu vi toleras tion?”

„Ho, mi diris, ne gravas.”

Mi turnis min, kaj direktis la parolon al la dika sinjorino.

„Mi aĉetas de vi duan loton, mi volas gajni alian pupon.” Mi donis al ŝi la monon kaj samtempe el la korbo prenititan koverton. Kiam ŝi ĝin malfermis por mi kaj elprenis rozkoloran karton, ŝi rigardis min ridetante ĉi-foje.

„Vi gajnis specialan premion,” ŝi diris.

„Specialan premion? Kion do?”

Per sia maldekstra mano ŝi indikis la junan virinon.

„Tie, ŝi diris, vi gajnis mian filinon. Ŝi estas via dum unu horo.”

„Vian filinon? Sed mi preferas pupon,” mi kriis, „belan pupon. Pupon por miaj infanoj.”

„Vi gajnis mian filinon. Ŝi estas via por unu horo,” ripetis la matrono.

Tiam mi denove rigardis la junan virinon. Ŝi rigardis min. Ŝi rigardis min petegante per siaj belaj, verdaj okuloj.

„Nu do, kunportu min, mi petas.” Tiel parolis ŝiaj okuloj...

Pupon por miaj infanoj. Ĉu mi diris tion? Estis ja absurde, mi ne havas infanojn, mi eĉ ne edziĝis.

Mi aliris la du virinojn.

„Bone, mi prenas la unuan premion.”

Mi vidis ke la juna virino emis min ĉirkaŭbraki, tiom ĝoja ŝi estis. Kial do? Mi nur estas tute normala viro. Ŝi prenis mian manon. Delikatan, molan manon ŝi havis.

„Vi gajnis la unuan premion. Vi ankaŭ povas elekti milionon,” diris la dika sinjorino.

„Unu milionon? Kion mi faru per tio? Mi ja ne indignigu Dion pro riĉeco. Kvankam... unu miliono...”

Sed la juna virino denove rigardis min petegante.

„Venu kun mi, kara,” ŝi flustris.

„Mi nomiĝas Marko, mi respondis. Kaj kiel vi nomiĝas?”

„Katja. Katja Perucio, Marko.”

Ŝi ne lasis mian manon. Ŝi ekstaris proksimen kontraŭ mi, ŝi disigis freŝan, agrablan lavendo-odoron. Mi vidis nur ŝin kaj neniun alian plu.

Kune ni eniris domon. La domo, mi ĝin ĝis tiu ĉi momento ankoraŭ ne rimarkis, estis bela patricia domo de la dek-sepa jarcento kun kvar altaj fenestroj. La pordo estis malfermita, sed, tuj post nia eniro, Katja fermis ĝin haste.

„Ho kara, kara,” ŝi diras. Ŝi brakumas min kaj kisas min sur la buŝo. Unufoje, dufoje, trifoje. Longa kiso.

„Kiom mi dankas vin, Marko. Vi estas bona homo, Marko.”

„Mi ne certas pri tio,” mi respondas. Mi sentas min en embaraso, kortuŝita.

„Venu, kara.”

Ni trairas salonon, belege ornamitan per mebloj de luksa stilo. Estas starigitaj lampoj kaj orumitaj lustroj, kies lumon reflektas speguloj altaj kiel homoj. Antaŭ granda pordo kuŝas pelto de besto kiun mi eĉ ne konas.

„Jes, estas tre bele ĉi tie,” ŝi diras, sed ne envidis la lukson, Marko.”

„Ĉu vi do ne vivas feliĉe ĉi tie, Katja?”

„Ne, ho ne.” Ŝi rigardas tre melankolie, sed kiam ŝi forturnas siajn okulojn de la lukso kaj denove rigardas min, ŝi ridetas.

„Nun mi estas feliĉa, Marko, nun ke vi estas ĉi tie.” Kaj ŝi prenas mian manon kaj gvidas min al alia ĉambro.

„Sed...”

„Venu, Marko. Tiu ĉi estas la dormoĉambro,” ŝi diras. „Vi ja gajnis hodiaŭ la unuan premion, ĉu ne? Kaj vi diris al sinjorino Kamarini ke vi ĝin akceptis.”

„Sinjorino Kambarini? Ĉu tio estas la nomo de via patrino?”

„Ŝi ne estas mia patrino, Marko.”

„Ho,” mi diras.

„Venu, Marko. Vi preferis min al miliono.”

„Jes, mi vidis ke vi tiel volis.”

„Vi estas bona homo, Marko. Venu.”

Ŝi demetas sian vastan supran robon. Mi rigardas surprizite. Sub ĝi ŝi portas longan, rozkoloran tulan robon, de supre ĝis malsupre travideblan. Ŝi staras inter mi kaj la lumo de staranta lampo. Ĉu ŝi intence faras tion? Mi vidas ŝian sveltan, nudan korpon tra la tulo. Ĝis alte kurantajn, sveltajn, bele formitajn gambojn, kaj kiam ŝi sin iomete turnas, starantajn, firmajn mamojn, kun malhela kerno. Ŝi estas radie bela kaj dezirinda. Ĉu ŝi vidas kion mi sentas, ĉu ŝi vidas tion en miaj okuloj?

„Venu, Marko.”

Ŝi ne restas pasiva, ŝi aliras min kaj komencas senvestigi min. Unue mia ĉapelo, poste mia jakso, miaj ŝuoj, miaj ŝtrumpoj. Kiom molaj ŝiaj manoj estas. Kial mi lasas ŝin fari? Ŝi malbukas mian pantalonon, tiel ke ĝi falas sur la plankon. Mi elpaŝas ĝin al ŝia direkto tiel ke mi tre mallonge tuŝas ŝian brakon. Varman, molan brakon. Sekvas mia ĉemizo kaj mia subĉemizo. Ŝi surgenuiĝas antaŭ mi kaj karesas miajn gambojn dum ŝi provas suben tiri la malgrandan bluan kalsoneton. Ĝi ie alkroĉiĝas.

„Ne, Katja.”

„Tamen jes, kara,” ŝi diras, dum ŝi singarde malkroĉas la bluan kalsoneton. „Vi ja promesis al sinjorino Kambarini.”

La tula robo, glate subenglitas de ŝi kaj ŝi kuŝigas sin sur la liton. „Venu, Marko.”

„Sed...”

„Estos plezure al mi, la unuan fojon en mia vivo,” diras ŝi. „Venu, kara.”

Kaj mi singarde ekkuŝas sur ŝi. Kaj tuj ŝajnas ke ne estas nia unua fojo. La onda moviĝado sub mi kiel la ondoj de la maro, la frotado, la suĉado. Kaj la premo de la malmolaj cicoj kaj la kisado de ŝia buŝo. Ne, tio ne estas nova, mi jam faris tion pli ofte, dekojn da fojoj, centojn da fojoj. Kaj kiam mi fermas miajn okulojn, tio ne mirigas min.

„Katja, ho Katja,” mi flustras.

Mi malfermas la okulojn, ŝi rigardas profunde en miajn okulojn, sen ke la dolĉa moviĝado de ŝia ondanta korpo sub mi ĉesas.

„Kiel vi sciis, kiel vi scias,” diras ŝi. „Venu, Marko, kara, fermu viajn okulojn, ne rigardu, nur sentu. Vi rajtas nur senti. Ek.”

Mi obeeme fermas miajn okulojn, mi kurbigas mian korpon kaj metas mian buŝon ĉe la dura, malhela bero sur ŝia dekstra mamoo.

„Jes, faru, faru, faru,” ŝi anhelas. Per siaj manoj ŝi puŝas mian kapon ankoraŭ pli suben. Ŝia cico ankoraŭ pligrandiĝas, ĝi ne fandiĝas en mia suĉanta buŝo. Kaj sub miaj koksoj, ŝia varma ventro ritme moviĝadas. Tiel daŭras la ludo, pli kaj pli intense kaj ni pensas ke la tempo haltis, sed ĝi ne haltis, ĝi plu kuras kvazaŭ freneze. Ĝis subite oni urĝe frapas sur la pordon. Ĉu ni fermis la pordon de la dormoĉambro? Kaj kiu ŝlosis ĝin?

„Katja!” Mi ektimas. Estas la voĉo de la matrono. „Katja, estas la horo. Rapidu, la horo pasis.”

Mi rigardas mian horloĝon. Jes, la horo pasis. Mi volas forlasi la dolĉan, ondantan maron sub mi, sed Katja metas siajn brakojn ĉirkaŭ mian kolon kaj tenas min kiel ostro en sia konko.

„Ne, Marko, ne. Restu. Ankoraŭ ne forlasu min.”

La frapado sur la pordon ne ĉesas. Ĝi intensiĝas. „Katja, rapidu! La horo pasis.”

Mi tiras min libera.

„Ne, Marko!”

Sed mi jam staras ĉe miaj aĵoj kaj haste vestas min.

„Ve, Marko,” ŝi ĝemas, „mi ne volas reiri, mi ne volas reiri, ĉu vi aŭdas? Tedas min tiu vivo. Mi ne volas enlitiĝi, ĉiutage denove kun fremdaj viroj.”

„Kaj mi, Katja, ĉu mi ne estas fremdulo?”

„Vi estas alia,” ŝi diras. „Tiom alia. Vi havas bonan koron. Vi estimas min. Vi demandis: ĉu estas bone? Ĉu ankaŭ al vi estas bone tiel ĉi, Katja? Neniam viro tiel demandis tion al mi.”

Denove oni frapegas la pordon. Kaj la voĉo de sinjorino Kambarini sonas alte kaj akre, malice kolera.

„Katja, ĉu vi venas aŭ ne? Hastu. Iu gajnis la unuan premion.”

Katja petege rigardas min per siaj belaj, verdaj okuloj. Ŝi ploras.

„Ĉu vi aŭdis tion?” ŝi demandas. „Denove iu gajnis la unuan premion.”

„Ĉu vi venas Katja, aŭ...,” krias Kambarini ekstere.

„Jes, mi venas.”

Katja vestas sin. Ankoraŭfoje mi rigardas tra la tulo al la agrable bela korpo. Ŝi metas la alian robon sur ĝin.

„Venu Marko, ni fuĝu.” Ŝi parolas per alia voĉo. Ŝi ne plu estas malĝoja.

„Fuĝi, Katja?”

„Jes, mi volas foriri de ĉi tie. Mi volas esti ĉe vi por ĉiam.”

„Sed kara mia.”

„Venu.”

Ŝi tiras la littukojn de la lito kaj ligas ilin per firma nodo. Kaj al tio ŝi fiksas la malpezajn litkovrilojn.

Mi scias kion ŝi volas. Kial mi partoprenas? Mi ligas unu ekstremaĵon de la improvizita ŝnuro al fenestroanso. La alian ekstremaĵon mi ĵetas tra la malferma fenestro.

„Vi unua,” ŝi diras.

„Ne, vi.”

Sed ŝi energie kapneas.

„Vi unua, Marko. Mi volas, ke vi sube kaptu min en viajn fortajn brakojn.”

Mi grimpas tra la fenestro kaj desupras rapide. Supre oni denove fervore frapas la pordon. Mi alvenas suben. Mi staras malantaŭe en ĝardeno.

„Nun vi!” mi krias.

„Mi venas.”

Ankaŭ ŝi subeniĝas rapide. La vento ludas sub ŝia robo. Mi vidas ŝiajn gambojn ĝis alte je ŝiaj femuroj.

„Jen mi.”

Ŝi lasas la ŝnuron kaj metas sin en miajn brakojn. Siajn brakojn ŝi metas ĉirkaŭ mian kolon. Mi sentas la premon de ŝia ankoraŭ varma korpo. Ĝi estas mola, tre mola, ĝi forfandiĝas kiel butero sub la suno.

„Katja, mia kara Katja,” mi malespere krias.

Mi kuras el la ĝardeno, al la strato.

„Katja!”

Mi staras sola antaŭ la granda, bela domo. Proksime de la stratangulo staras budo. Dika sinjorino, vestita laŭ Felini, vendas lotetojn. Mi febre okulserĉas la junan virinon kun la verdaj okuloj. Ŝi ne estas tie.

„Kie estas via filino?” mi demandas.

Sinjorino Kambarini rigardas min per okuloj brulantaj pro malamo.

„Tiu estas for, fuĝinta,” ŝi respondas. „La fiulino, la diabla fiulino.”

Mi aĉetas de ŝi loton. Mi gajnas pupon.

„Pupo por mia infano,” mi diras. Sed mi ne havas infanon. Mi eĉ ne edziĝis...

* * *

Marko silentas. Silvia rigardas lin.

„Ĉu tio estas la fino de via rakonto?” ŝi demandas.

„La fino de mia sonĝo, Silvia.”

„Strange, Marko, ke tiu Katja tiom subite malaperis. Ĉu vi trovas tion normala?”

„Ne, tiam, dum mia sonĝo ne. Mi eĉ tute ne povis akcepti tion. Sed nun ja. Nun mi povas.”

„Kiel do? Nun ja?”

„Jes, kara, mi ja havas vin.”

„Strange tamen,” ŝi reagas. Ŝi aspektas iom malbonhumora. Ĉu Marko sentas tion?

„Kio estas al vi, kara?”

„Mi ne ŝatas tiajn sonĝojn,” ŝi diras.

Li ridetas kaj kapsignas.

„Tio estas pruvo, ke vi amas min, Silvia. Kaj estis nur sonĝo. Sonĝon oni ne povas devigi.”

„Jes,” ŝi flustras, „estis nur sonĝo. Feliĉe. Nu, vi estas tute maldorma nun. Prenu min, prenu min reale, Marko. Kaj poste ni kune fuĝos.”

„Al la ĝardeno?”

„Jes.”

„Kaj... tra la fenestro?”

„Ne, prefere laŭ la ŝtuparo,” diras ŝi. „Ne ĉio devas okazi kiel en via sonĝo. Sed longan, tulan robon, tion mi ja havas.”

Ŝi iras el la lito por preni la robon kaj revenas ĉe sia amato. Tio estis la komenco de la fino de la dek-kvara tago.

La bela petveturantino

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

Nuda en la marĉlago

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

La piedflegisto

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

Vivolaca (1)

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

Vivolaca (2)

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

Aliaj libroj de la sama aŭtoro

La bela petveturantino estas la tria en serio de kvar esperantlingvaj erotikaj novelaroj de Leopold Vermeiren. En ĝi rolas la samaj ĉeffiguroj kiel en *La nuda feino*, *La ludanta lumo* kaj *La egipta dancistino*: la juna poeto Marko, kiu ĉiuvespere rakontas al sia rava amatino Silvia unu erotikan rakonton. La rakonton li brodas ĉiam ĉirkaŭ tri vortoj, kiujn lia amatino donas al li. Nur post ĉiu rakonto, ne pli frue, la junulo rajtas mem komenci la amoradon kun ŝi.

Leopold Vermeiren estis en Flandrio famkonata aŭtoro, konata ĉefe pro tute alia ĝenro: Li estas la verkinto de pli ol ducent libroj por la junularo, ĉefe pro la serio *De rode ridder* (La ruĝa kavaliro). Liajn erotikajn romanojn kaj novelarojn li eldonis en la nederlanda lingvo sub la pseŭdonimo Paul Ticher.

Leopold Vermeiren mem parolis Esperanton. La nuna novelarserio tamen estas tradukita el la nederlanda originalo. Danke al la Esperanto-tradukoj, liaj noveloj nun aperis en pluraj aliaj lingvoj.

La verkon *La bela petveturantino*, same kiel la aliajn, oni povas plej bele priskribi per la vortoj de Rejna de Jong en *Heroldo de Esperanto*: „La etoso de la tuta verko: erotika, poezia, milde ironia, fantaziplena, kaŭzas, ke la legado estas vera ĝuo.”

Kolofono

Titolo: La bela petveturantino

Aŭtoro: Leopold Vermeiren

Tradukis: Lode Van de Velde

Kovrilo: Hugo Fontyn

Tekstaranĝo: Erik D'Hondt kaj Paŭl Peeraerts

ISBN: 978 90 71205 67 3

UDK: 82.3.892

NUR: 330

Leĝa depono: D/1996/2924/1

Flandra Esperanto-Ligo

Lange Beeldekenstraat 169 - BE-2060 Antverpeno

www.retbutiko.be

© 1996 ĉe la aŭtoro

Tiu ĉi libro estas la daŭrigo de „La nuda feino” kaj „La ludanta lumo”. Ĝi tamen estas ĝuebla ankaŭ kiel aparta novelaro.